

Johann Wolfgang von Goethe,  
La rozeto

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Knabo vidis – jen rozeto  
Sur la kampo staras;  
Bela, juna la floreto . . .  
Vive kuras la knabeto,  
Ĝojas, miras, flaras.  
Sur la kampo la rozet'  
Kiel infanet'.

Knabo diris : « mi eltiros  
Belulinon mian »;  
Floro diris : « vi foriros, –  
Per pikiloj mi disŝiros  
Tuj la manon vian ».  
Sur la kampo la rozet'  
Kiel infanet'.

La sovaĝa knab' ridante  
La rozeton prenis, –  
La floreto batalante  
Sin defendis pikadante,  
Sed la sorto venis.  
Sur la kampo la rozet'  
Kiel infanet'.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Knab' rozeton vidis li

*tradukita de Joachim Gießner*

Knab' rozeton vidis li;  
erikeja floro.  
Juna, bela estis ĝi.  
Por admiru kuris li  
ĝoje kun adoro.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
erikeja floro.

Diris knab': „Mi rompos vin,  
vi rozeta floro“.  
Diris roz': „Mi pikos vin,  
ke vi ne forgesos min,  
premas min doloro.“  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
erikeja floro.

Knab' sovaĝa rompita ĝin;  
erikeja floro.  
Rozo ja defendis sin  
kaj sufere pikis lin,  
ne utilis ploro.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
erikeja floro.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Dornrozeto

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Vidis knab': Jen, juna floro!  
Rozujet' kampara!  
Bela, kiel la aŭroro!  
Li alkuris ĝoje por  
Vidi, kiel kara!  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
Rozujet' kampara.

Diris knab': Mi volas vin,  
Rozujet' kampara.  
Diris roz': Mi boras vin,  
Ĉiam vi memoras min,  
Pro l' dolor' amara.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
Rozujet' kampara.

Knabo rozon ŝiris do  
De l' rozuj' kampara,  
Ĝi, defende, pikis tro!  
Sed ne helpis ve kaj ho  
Kontraŭ vol' barbara.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
Rozujet' kampara.

...

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)*

*Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.*

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)*

*Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.*

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 – †1976).*

*Arg-1022-2226 (2014-12-16 16:56:40)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas interalie en <http://egalite.hu/kalocsay/eterna/dornrozeto.htm>.*